

Papias el Hierapolo

Fragmentoj

El la Greka kaj Latina
tradukitaj de Gerrit Isai Berveling

Broŝure:

Papias el Hierapolo

Fragmentoj

El la Greka kaj Latina tradukitaj de Gerrit Isai Berveling

Voĉoj Kristanaj 38

VoKo, Rijswijk 2020

(planita)

Interrete:

Fragmento 2 (Eusebius, Hist. Eccl.):

<http://www.perseus.tufts.edu>

[/hopper/text?doc=Perseus%3Atext%3a2008.01.0640](http://www.perseus.tufts.edu/hopper/text?doc=Perseus%3Atext%3a2008.01.0640)

Lastfoje kontrolitaj: 2020-04-26

Fragmentoj de Papias^{1 2}

Λόγια του Παπία

Unua fragmento:

Fekundeco de la tero en la estonta miljaro

1 *1 La kreaĵaro renovigita kaj liberigita donos multege pli da ĉiuspecaj manĝaĵoj sur la tuta tero pro la roso el la ĉielo kaj la fekundeco de la tero, same kiel la presbiteroj memoras, ke ili vidis Johanon, lernanton de la Sinjoro, kaj ke ili aŭdis de li, kiel la Sinjoro instruis al li pri tiuj tempoj kaj diris:*

2 Venos tagoj, kiam kreskos vinberarbetoj, el kiuj ĉiu havos dek mil sarmientojn, kaj ĉiu sarmiento dek mil branĉetojn, kaj ĉiu branĉeto dek mil ŝosojn, kaj ĉiu ŝoso dek mil grapolojn, kaj ĉiu unuopa vinbero – premata – donos dudek kvin metrojn da vino³. 3 Kaj se unu el la sanktuloj ekkaptos unu el tiuj grapoloj, alia krios: Mi estas pli bona, prenu min, kaj laŭdu la Sinjoron per mi. Sammaniere tritiksemo generos dek mil spikojn, kaj ĉiu unuopa spiko havos dek mil grajnoj, kaj ĉiu unuopa grajno donos kvin du-funtojn⁴ da pura faruno: kaj sammaniere ĉiuj fruktoj kaj la semoj kaj la ceteraj plantoj, ĉiu konforme al sia

¹ Kursiva tradukaĵo estas Latine en la originalo, la cetero Greke.

² Vidu ankaŭ en Gaston Waringhien – NI kaj ĜI, p. 90-99: Ha, tiu Papias!

³ 39.294 litroj.

⁴ Romia funto = 327 gramoj.

naturu; kaj ĉiuj bestoj, kiuj uzas tiujn fruktojn de la tero, fariĝos pacemaj kaj reciproke sin komprenos, submetiĝante al la homoj. 4 Papias, kiu estis aŭdinto de Johano mem kaj poste fariĝis amiko de Polikarpo, tion skribe atestas kiel maljunulo en la kvara el siaj libroj: li ja skribis kvin librojn. Kaj li aldonis:

5 Tio ja estas kredinda por la kredantoj. Kaj – li aldonas – kiam Judaso la perfidanto tion ne kredis kaj demandis: Kaj kiel do tiaj fruktoj kreskos? la Sinjoro diris: Tion vidos, kiuj tiam vivos.

(Ireneo – Kontraŭ Herezuloj V.33, 3-4)

Dua fragmento: La verko de Papias

2 1 De Papias estas laŭnombre kvin libroj, kun la titolo «Klarigo pri la Sinjordiroy». Ireneo mencias tiujn kiel liajn nurajn verkojn, dirante jene: Papias tion ktp. 2 Tion do <diras> Ireneo. Sed Papias en la enkonduko al siaj propraj Sinjordiroy en nenio asertas, ke li mem estis aŭskultinto aŭ vidinto de la sanktaj apostoloj, sed li instruas, ke li ricevis la aferojn de la fido de homoj, kiuj konis tiujn apostolojn persone:

Enkonduko de la verko de Papias

3 Mi ne hezitas sciigi al vi, kion de la presbiteroj mi bele eksciis kaj bele memoras, kaj mi estas tute certa pri ĝia vereco. Ĉar mi ne, kiel la plimulto, ĝojas pri tiuj, kiuj multon parolas, sed pri tiuj, kiuj instruas la veron, ne pri tio, kio memorigas fremdulajn instruojn, sed pri tio, kion la Sinjoro donis por nia fido kaj kio venas de la vero mem. 4 Kaj se foje iu venis el tiuj, kiuj sekvis la presbiterojn, mi distingis la parolojn de la presbiteroj: Kion diris Andreas, kion Petro, kion Filipo, kion Tomaso aŭ Jakobo, kion Johano aŭ Mateo, aŭ kion iu alia el la lernantoj de la Sinjoro, kaj kion Aristiono kaj la pliaĝulo Johano, lernantoj de la Sinjoro. Ĉar mi ne pensis, ke la diroj el la Biblio sammulte povas utili al mi, kiom diras la vivanta kaj daŭra Parolo mem.

Komento de Euzebio

5 Valoras la penon atenti, ke Papias dufoje mencias la nomon Johano, unue li metis lin en la listo kun Petro, Jakobo kaj Mateo kaj la ceteraj apostoloj, klare indikante la evangeliston, sed la alian Johano li metas aparte dis de la nombro de la apostoloj, dum Aristionon li antaŭmetas, klare indikante lin kiel maljunan. 6 Tiel do per tiu atesto pruviĝas vera la historio, kiu diras, ke en Azio estis du kun la nomo Johano, kaj ke en Efezo estis du tomboj, kaj ke ambaŭ nomiĝis, ankoraŭ nun, «de Johano». Pri tiuj faktoj oni devas atenti. Ĉar estas verŝajne, ke la dua – se oni ne preferas la unuan – spektis la vizion, kiu portas la nomon Apokalipso de Johano.

7 Kaj tiu Papias, pri kiu ni nun parolas, diras, ke la dirojn de la apostoloj li ricevis de tiuj, kiuj ilin mem aŭskultis, kaj li diras, ke persone li aŭdis Aristionon kaj la presbiteron Johano. Do laŭnome ofte li ilin mencias kaj en siaj verkoj li metas ilian tradicion. Kaj niaflanke tio ne sengajne estu dirita.

Aliaj rakontoj de Papias

8 Valoras la penon aldoni al la cititaj vortoj de Papias aliajn liajn dirojn, en kiuj ankaŭ aliajn paradoksajn aferojn li rakontas, kiel transdonitajn al li. 9 Ekzemple ni jam rakontis pri la restado de la apostolo Filipo en Hierapolo kune kun siaj filinoj; sed nun ni devas rakonti, kiel Papias, kiu vivis tiutempe, mencias, ke li ricevis el la buŝo de la filinoj de Filipo iun mirindan historion. Li rakontas fakte, ke en lia tempo okazis resurekto de iu mortinto; kaj krome okazis alia miraklo al Justo, kiu kromnomiĝis Barsabas, kiu trinkis mortigan venenon, sen suferi ajnan damaĝon, dank' al la Sinjoro. 10 Tiun Juston post la resurekto de la Savinto la sanktaj apostoloj starigis kun Mathias anstataŭ la perfidinto Judaso, kaj ili preĝis por ili por replenigi ilian nombron, kiel rakontas la libro Agoj: «Kaj ili starigis du: Jozefon, kiu nomiĝis Barsabas, kiu ankaŭ nomiĝis Justo, kaj Mathiason; kaj preĝinte ili diris⁵.» 11 Kaj tiel en tiu stilo Papias enmetas ankaŭ aliajn rakontojn, kiuj lin atingis per buŝa tradicio, ankaŭ kelkajn

⁵ Agoj 1:23-24.

strangajn parabolojn pri la Savinto kaj instruojn de li kaj kelkajn aĵojn pli mitecajn.

La miljarismo

12 En tiuj mitoj estas ankaŭ, ke oni diras, ke estos Miljaro post la resurekto el la mortintoj, kaj ke la regno de Kristo laŭkorpe realiĝos sur tiu ĉi tero; ĉe tio mi supozas, ke Papias misinterpretis la rakontojn de la apostoloj, kaj ke li ne komprenis, kion en ekzemploj ili mistike rakontis.

13 Mense li estis sufiĉe malgranda, kiom mi povas konkludi el liaj propraj vortoj; tamen li trovis la kulpon ĉe la plimulto de la homoj de la eklezio, kiuj akceptis la saman opinion post li, ĉar ili sin defendis per la antikveco de tiu viro, same kiel ekzemple tion faras Ireneo kaj ĉiu alia, kiu montriĝas same opinii.

14 En sia verko Papias ankaŭ transdonas aliajn klarigojn pri la Sinjordiroy, kiujn aŭdis la jam menciita Aristiono, same kiel tradiciojn de la presbitero Johano. Tien ni plusendas la homojn, kiuj pri tio interesiĝas.

La unuaj du evangelioj

Nun necesas, ke ni aldonu al la cititaj vortoj de Papias la tradicion, kiun li dismetas pri Marko, la aŭtoro de la evangelio.

15 La presbitero tamen diris jene: Sed Marko fariĝis interpretisto de Petro, kaj li skribis ekzakte, sed senorde ĉion, kion tiu menciis pri la aferoj diritaj aŭ faritaj de la Sinjoro; li ja ne persone aŭdis la Sinjoron, nek estis mem lia sekvanto, sed poste, kiel li mem diras, <li estis sekvanto> de Petro, kiu donis siajn instruojn laŭ la bezonoj, sed ne kiel iu, kiu metas ordon en la Sinjordiroy. Marko do neniel eraris, kiam li kelkajn aferojn skribis laŭ sia memoro; ĉar sian zorgemon li metis en unu afero: ke nenion el tio, kion li aŭdis, li ellasu, kaj ke li ne mensogu en tio.

Tio do estas la raportaĵo de Papias pri Marko. 16 Sed pri Mateo li diras jenon:

Mateo en Hebrea lingvaĵo dismetis la (Sinjor)diroyjn, kaj ĉiu tradukis ilin, kiel li kapablis.

17 Papias mem uzas atestaĵojn el la unua letero de Johano kaj same el tiu de Petro, sed li krome dismetas ankaŭ alian historion pri la virino akuzita antaŭ la Sinjoro pri multaj pekoj, historio, kiun enhavas la Evangelio laŭ la Hebreoj. Kaj tio ŝajnis al ni konservinda, precipe la jam dismetita.

(Euzebio – Historio Eklezia, III.39.)

Tria fragmento: Pri la sorto kaj puno de Judaso

3 1 De Apolinario: Judaso ne mortis je pendŝnuro, sed li postvivis, ĉar li liberiĝis antaŭ ol li sufokiĝis. Kaj tion montras la Agoj de apostoloj, ĉar li falis kapantaŭen, kaj li diskrevis, kaj elŝutiĝis liaj internaĵoj⁶. Tion plej klare rakontas Papias, la lernanto de Johano, dirante jene en la 4a libro de sia Klarigo pri la Sinjordiroy:

2 Kiel granda signo de malpieco venis en ĉi mondon Judaso, kiu tiom ŝveliĝis en sia karno, ke li ne povis trairi, kie eĉ ĉaro facile povus preterpasi – eĉ ne nur la pinto de lia kapo. Oni rakontas, ke la palpebroj de liaj okuloj tiom sveliĝis, ke li entute ne povis vidi la lumon, kaj ke liaj okuloj ne povis esti vidataj de kuracisto, eĉ ne per lupeo; tiom diste ili troviĝis de la ekstera surfaco. Lia seksorgano onidire estis pli forpuŝa kaj pli ampleksa ol ĉio hontinda, kaj el lia tuta korpo fluis puso kaj larvoj por hontigi la proprajn ekskrementojn. 3 Post multaj suferoj kaj punoj li mortis, onidire, sur sia propra tereno, kiun li postlasis dezerta kaj nelogata pro laodoro ĝis nun, sed eĉ ĝis hodiaŭ neniu povas pasi tiun lokon, krom kunpremante perfingre sian nazon. Tiel terura estis la elfluo el lia karno sur tiu tero.

⁶ Agoj 1:18.

Kvara fragmento:

La anĝeloj ĉe la kapo de l' regado de la mondo

4 1 Papias diras laŭlitere: Al kelkaj el ili, t.e. al tiuj, kiuj antaŭe estis Diaj anĝeloj, Li donis regadon pri la ordigo de la Tero, kaj Li ordonis ilin bone ordoni. Kaj tuj poste li diras:

Sed okazis, ke tiu ordono rezultis en nenion.

(Andreas Caesar – In Apoc., c. 34, serm. 12.)

Kvina fragmento:

Inspiro de la Apokalipso

5 1 Ni opinias superflua vastigi la diskuton pri la Dia inspiro de la libro (temas pri Apokalipso de Johano), kiam akceptas, ke ĝi meritas nian fidon, la beataj Gregorio la Teologo kaj Kirilo, kaj se krome ĝian fidinecon atestas ankaŭ la pli fruaj Papias, Ireneo, Metodio kaj Hipolito.

(Andreas Caesar – In Apoc., prefac.)

Sesa fragmento:

Alegoria interpreto de la Laboro de la ses tagoj

6 1 Preninte deirpunkton de Papias, la famulo el Hierapolo, kiu estis disĉiplo de tiu, kiu ripozis ĉe la brusto de la Sinjoro, kaj de Klemento kaj Panteno, la pastro de Aleksandrio, kaj de la plej saĝa Amonio, interpretistoj plej fruaj kaj antaŭ la sinodoj, kiuj komprenis la tutan laboron de la ses tagoj de Kristo kaj de la Eklezio.

(Anast. Sinait., Contempl. anagog. in Hexaëm., 1.I.)

Sepa fragmento: Alegoria interpreto de la Paradizo

7 1 La plej antikvaj de la ekleziaj ekzegezistoj, mi intencas Filonon la filozofon, samtempulon kun la apostoloj, kaj Papias, disĉiplo de Johano, el Hierapolo ... kaj iliaj sekvantoj, komprenis spirite ĉion koncerne la paradizon, aplikante ĝin al la eklezio de Kristo.

(Anast. Sinait., Contempl. anagog. in Hexaëm., 1.VII.)

Oka fragmento: La senkulpaj nomiĝas Infanoj

8 1 Tiujn, kiuj ekzercis sin en senkulpeco, ili nomis infanoj, kiel klarigas ankaŭ Papias en la unua libro de sia Klarigo pri Sinjordiroj kaj Klemens el Aleksandrio en sia Pedagogo.

(Maximus Conf., Schol. in Dionys. Areop.)

Naŭa fragmento: Ĝui la manĝon post la resurekto

9 1 Tion li diras, miaopinie aludante al Papias el Hieropolo en Azio, kiu tiutempe estis episkopo kaj atingis maturecon en la tempo de la Dia evangeliisto Johano. Tiu Papias en la kvara libro de sia Klarigo pri Sinjordiroj parolas pri ĝuado de manĝoj post la resurekto ... kaj Ireneo de Lugduno (= nuna Lion en Francujo) diras en la kvina libro kontraŭ herezuloj la samon, kaj citas kiel atestanton pri siaj diroj la menciitan Papiason.

(Maximus Conf., Schol. in Dionys. Areop.)

Deka fragmento: La Regno de la Ĉielo laŭ Papias

10 1 ... nek pri Papias, la episkopo de Hierapolo kaj martiro, nek pri Ireneo, la sankta episkopo de Lugduno (Stefano parolas), kiam li diras, ke en la regno de la ĉielo ekzistas certa ĝuado de manĝaĵoj.

(Stephanus Gobarus, apud Phot. Bibliotheca, cod. 232.)

Dek-unua fragmento: La 2a kaj 3a Leteroj de Johano kaj Apokalipso. Mirakloj

11 1 Papias, episkopo de Hierapolo, kiu estis aŭdanto de Johano la Teologo kaj ankaŭ akompananto de Polikarpo, verkis kvin librojn da Sinjordiroy. En ili farante listigon pri la apostoloj, post mencio pri Petro kaj Johano, Filipo, Tomaso kaj Mateo, inter la lernantoj de la Sinjoro li ankaŭ metas Aristionon kaj alian Johanon, kiun li nomis la presbitero. Tial kelkaj pensas, ke de tiu Johano estas la du leteroj malgrandaj kaj katolikaj, kiuj iras sub la nomo Johano, ĉar la malnovuloj akceptas nur la unuan. Kelkaj ankaŭ ekzistas, en tio erarante, kiuj atribuas al li la Apokalipson. Papias ankaŭ eraras pri la Miljaro, de kio rezultas la eraro de Ireneo.

2 Papias en sia dua libro diras, ke Johano la Teologo kaj Jakobo, lia frato, estis mortigitaj de la Judoj. La menciita Papias rakontas, kiel aferon ricevitan de la filinoj de Filipo, ke Barsabas, ankaŭ nomata Justo, devigita de la nekredantoj trinki venenon de eĥidno, en la nomo de Kristo sendamaĝe estis savita. Ankaŭ aliajn miraklojn li rakontas, interalie la restariĝon el la mortintoj de la patrino de Manaimo; pri la restarigitoj de Kristo el la morto, li diris, ke ili vivis ĝis Hadriano.

(Philippus Sidetes, cf. TN 5, 2 [1888], 170.)

Dek-dua fragmento: Martiriĝo de Johano, antaŭdirita de la Sinjoro

12 1 Post Domiciano unu jaron regis Nervo, kiu vokis Johanon de la insulo Padmo, kaj permesis al li loĝi en Efezo. Sola postvivanto el la dekdu disĉiploj kaj verkinto de la Evangelio de lia nomo, li akiris la gracon de la martiriĝo. 2 Fakte Papias, la episkopo de Hierapolo, kiu estis okulatestanto, diras en sia dua libro da Sinjordiĝoj, ke li estis mortigita de la Judajoj; konfirmante kun sia frato la diron pri ili de la Sinjoro, kaj ilian konfesion pri tio kaj konsenton; ĉar la Sinjoro diris al ili: Ĉu vi povas trinki la kalikon, kiun mi trinkas? Kaj kiam ili jesis kaj akceptis, li diris: Mian kalikon, li diris, vi trinkos, kaj per la bapto, per kiu mi estas baptata, vi estos baptita⁷.

Kaj prave: Dio ja ne povas mensogi. 3 Tiel do la scienculo Origeno en sia interpretado pri la evangelio laŭ Mateo (t. XVI, c. 6) forte konfirmas, ke Johano suferis martiriĝon, sciigante ke tiun informon li ricevis de la posteuloj de la apostoloj. Kaj la granda klerulo Euzebio en sia Eklezia Historio (III,1) diras: Tomaso elektis Partion, Johano elektis Azion, kie en Efezo li mortis.

(Georgius Hamartolus, Chronicon, ed. H. Nolte, Theol. Quartalschrift, 44 [1862], 466 s.)

Dek-tria fragmento: Evangelio laŭ Johano

13 1 Komenciĝas la argumento, laŭ Johano.

La Evangelio laŭ Johano estis manifestita kaj data al la eklezioj de Johano, kiam li ankoraŭ estis en la korpo, kiel rakontas Papias, laŭnome Jeruzalemano, amata disĉiplo de Johano, en la Ekzoterikaj, t. e. en la lastaj kvin libroj. 2 [Li skribis la Evangelion rekte sub diktado de Johano. Sed la herezulo Marcion, kiam li estis

⁷ Marko 10:38-39.

*de li malakceptita, ĉar li kontraŭe opiniis, estis forĵetita de Johano. Sed skribaĵojn
aŭ epistolojn li transdonis al li de la fratoj, kiuj estis en Ponto.]*

*(Cod. Vatic. Alex. 14, s. IX, ed. J. M. Thomasius,
Card. Opp. I, 344; Romae 1747;
Pitra, Analecta Sacra, II, 160.)*
